

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



EKO 2023 / 32. Junio 3 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Pezo: Word: 168 KB; PDF: 257 KB; demandilo 115 KB. Sume: 540 KB

temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.

Alvenas la centa seminario de AMO

Post monato okazos la centa seminario de AMO (Aktivula Maturigo). Ĝi okazos en Hungario fizika kunveno, en la urbo Tiszafüred, oriente de Budapeŝto, atingebla trajne. SMG preparos mapon por atingi la AMO-ejon de la stacidomo (piede farebla). Se iu venos el eksterlando, petu tiun mapon, kiun mi cirkuligas nur en Hungario.

La seminario okazos en la 20-a de junio (marde) inter 09:30 kaj 12:30 (CEST). UTC: ekde 07.30. Reta aliro per Zoom estos, ni dissendos la aliro-informojn.j.

La temo estas tre vasta: **'Esperanto aganta en la 21-a jarcento'**

Jen la jam sendita enhavo (nigre) kaj novaj demandoj (ruĝe).

Ni aliras la temon sub kvin temoj; ne tro multaj sed kovrantaj multon:

- Kulture, literature
- Organize, lande
- Interes-teme, fake
- Renkontiĝe, kongrese
- Komunike, mesaĝe



Kulture, literature

1. Kiu estas niaj literaturaj atutoj? Kiel eluzi ilin pli efike?
2. Kiel ni evoluigu niajn kulturajn agadojn?
3. Kiel uzi Eo-kontaktojn por sproni transnaciajn projektojn?

4. Kiu literaturaĵoj pleje donas al vi plezuron?

Organize, lande

1. Kiel ni trovu kaj subtenu niajn mortintajn landajn asociojn?
2. Kiel UEA kaj ILEI kaj aliaj fortigu funkciantajn asociojn kaj sekciojn
3. Kiel mobilizi lokajn grupojn por kontribui al la nacia agado?

4. Kiel konigi ekzemplojn de elstara landa aktivemo?

Interes-teme, fake

1. Kiel eluzi la meritojn de niaj fakaj asocioj?
2. Kiel revivigi la multajn neaktivajn fakajn asociojn?
3. Kiel fortigi la rilatojn de FA kun samfakaj nemovadaj instancoj?

4. Kiuj estas la elstaraj ekzemploj de tiu ekstermovada kontaktado?

Renkontiĝe, kongrese

1. Kiel fortigi la rolojn de kontinentaj, landaj kaj lokaj renkontiĝoj?
2. Kiel konigi lokajn renkontiĝojn, ankaŭ fakajn?
3. Kiel utilis la <Eventa Servo> de UEA tiucele?

4. Kio logus vin partopreni renkontiĝon?

5. Kiel uzi informojn al la ekstero por montri Eo-aktivecon?

Komunike, mesaĝe

1. Kiel UEA, ILEI kaj aliaj eluzu la retajn eblojn?
2. Kiel tiuj uzu komunikilojn por pli efike konigi sin?
3. Kiel UEA kaj ILEI kaj aliaj fortigu sian internan komunikadon?

4. Kiel vi komunikas kun esperantistoj?

Alkroĉita estas demandilo. Plenigu ĝin, ni anoncos la rezultojn antaŭ la seminario!

ILEI-sekcio en Hispanio – tio sukcesu!

Kolegoj, kiel Viko kaj mi, ŝatus krei la hispanan sekcion de ILEI. Inter tiuj aliaj kolegoj, estas Fabián, instruisto pri Geografio kaj Historio, kiu jam sukcese instruas Esperanton en oficiala mezlernejo kiel elekteblan lerno-fakon. Ni ankoraŭ pripensas niajn paŝojn, sed ni jam certas pri unu el ili. Mi skribas ĉi tie por demandi ĉu estas permesite traduki la raporton de Alessandra Madella, *L'esperanto: facilità di apprendimento e aiuto nello studio di altre lingue*, al la hispana. Per diversaj medioj mi provis kontakti ŝin, sed mia klopodo estis sensukcesa. Eduardo Berdor (instruisto de Esperanto en UNED -*Nacia Universitato de Distanca Edukado*) scipovas la italan kaj proponas sin por la traduko, kun helpo de aliaj kolegoj. Ni uzu tiun dokumenton por diversaj instancoj. Aldone, kelkaj el ni interesiĝas pri la projekto 30oredoro kiel eblo por disvastigi Esperanton en Hispanio.

Juan Diego (Hüandi) [jd.diazbautista\[cxe\]gmail.com](mailto:jd.diazbautista[cxe]gmail.com)

PS de SMG: Brava iniciato. La hispana movado fortas, precipe pri kongresoj kaj bitbultenoj kaj muzikaj videoj. Sciu, ke ILEI en Hispanio ja havas reprezentanton. Bonus plekti tion en la sekcia fondado, se eblos. Temas pri Eduardo Berdor en Zaragosa (eduardo.berdor@ gmail.com). Vidu en IPR 2023/1 fine de la revuo. (Sekciaj informaj aperas tie unufoje jare.)

Balkanio kaj Greklando

La iniciato por Balkana Kunlaboro estas malnova okazo, kiu malaperis en la lastaj tempoj, sed dependas de ni revigligi ĝin. En la 1980-aj jaroj komenciĝis balkanaj konferencoj, kiujn ni devas revenigi. En 1984 tia Konferenco estis gastigita en Grekio, kaj jena filmeto estas intervjuo de grekaj esperantistoj, ĉe greka televido, okaze de la malfermo de la Konferenco. Mi subtekstigis ĝin en Esperanto por ke vi povu spekti ĝin. Mi sendas ĝin kiel fonton de inspiro.

<https://youtu.be/Yhj1h0pZBBA>

Inter la iniciatoj faritaj de la nova generacio de esperantistoj en Grekio, estas la kreado de tiu ĉi YouTube-kanalo, kun malnovaj filmetoj pri Greka Esperanto-Asocio.

<https://www.youtube.com/@HelenaEsperantoAsocio>

Mi jam subtekstigis plurajn el ili, kaj ili ĉiuj estos baldaŭ subtekstigitaj. Bonvolu sciigi nin, ĉu vi jam kreis tian kanalon por via Asocio. Se iu bezonas subtenon por krei tian kanalon, mi volonte helpas.

Andreas Zervas

Kursoj en Krakovo

La Jagelona Universitato proponas dusemajnan, malmultekostan (34 eŭroj) lingvan kurson, je meza nivelo. Se iu iam volus scii, kiel oni lernas en la kursoj de ĉi tiu universitato, nun povas sperti iom da lernado. Okazos tri 3-horaj renkontiĝoj. La studado komenciĝos nun kaj daŭros ĝis la fino de majo. Bv. peti pli da informoj, skribante al: esperanto.instruado.jag.univ.pl(@ gmail.com).

Priskribo de la kursoj

Kursoj estas internaciaj, enretaj, kun instruistino, gvidataj realtempe, 54-horaj. Universitata kategorio: *specialaj* kursoj.

1 Kurso 1: Eraroj ne estas pekoj, sed... korektu ilin!

Agrable korektu ĉiajn malperfektaĵojn en via lingvouzo, en rekta interreta kontakto kun sperta instruistino. Vi ricevos multe da helpo pri la individua uzado de la lingvo.

2 Kurso 2: Kurso por verkistoj kaj aliaj verkemuloj

La skribaj aktivaĵoj ampleksas leksikon, gramatikon (i.a. komprenon de funkciado de la akuzativo kaj de la artikolo, eksplikatajn semantike, originale), donas specialan atenton al sintakso kaj stilo. La programo respektas la individuan stilon de la partoprenantoj, okazas laboro pri ties disvolvado, krome, lernado per la stilo de modelaj verkintoj de la Esperanto-literaturo. La partoprenantoj faras (sukcese!) interesajn kaj nekutimajn, foje eĉ kaprompajn ekzercojn. La revuo *Monato* instigis siajn kunlaborantojn partopreni la *Kurson por verkistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj verkemuloj*, kiu estis planita por la universitata jaro 2022/2023. Aliĝis al la kurso entute ses ĵurnalistoj de la *Monato* (koincide, du aliaj kunlaborantoj de la revuo ekstudis en alia kurso). La Flandra Esperanto-Ligo, eldonanto de la revuo, subtenis

finance partoprenon de kvar personoj. La tuta kontribuo de *Monato* ebligis funkciigon de aparta kurso por ĵurnalistoj.

③ Kurso 3: Kurso por ĵurnalistoj

Jen la programo: ĝenerala ĵurnalistiko, Esperanta ĵurnalistiko kaj verkado de artikoloj en Esperanto (tuteca aliro). La studentoj ricevas helpon disvolvi proprajn talentojn, instigon partopreni konkursojn k.a. Kadre de la kurso la ĵurnalistoj faris realajn, interesajn intervjuojn kun esperantistoj, pri neesperantaj temoj, cele al publikigo. La kursoj apartenas al la oficiala programo de la Jagelona Universitato. La diverslandaj kursanoj estas registritaj en la universitato same, kiel la lokaj gestudentoj, kaj la programoj, la nombro de la partoprenantoj en la kursoj de Esperanto k.a. informoj eniras la oficialajn raportojn kaj statistikojn. En la lernantaj grupoj regas amikeca etoso. Iuj partoprenantoj amikiĝas. Estiĝas ankaŭ konkretaj kontaktoj, respondantaj al interesoj aŭ aspiroj de la partoprenantoj.

Aperis la revuo *La Merkato*, numero 102,

Alkroĉe ĉi tie, la 102a numero de nia kara revuo, *La Merkato*, nun estas elŝutebla senpage el nia retejo www.ikef.info Jen la enhavo de la revuo:

- Vortoj al la legantoj (John Huang)(p. 3)
- Nova kontribuo por nova epoko (Longarko Zhang) (p. 4)
- Norda vinfarado: Kiel la metia vinindustrio de Nov-Skotio revigligas kamparajn regionojn? (Claudia De Fuentes) p.6)
- Ĉampano, la plej fama vino (Paul Quevy Lefevre).....(p.11)
- Vendu Sperton, ne Produkton: Lecionoj el malgranda vinfarejo en Usono (Kejt Porter).....(p. 14)
- Konatiĝu kun Nepalo (Poshraj Subedi)(p.17)
- Esperplena loko, Hajnano! (Longarko Zhang).....(p. 21)
- Prezentas la mondon de Wix: Wix-Partnero (Yas Kawamura)(p. 24)
- Pri laborperejo.com (Jan Michalak)....(p. 28)
- Pri IKEF (Chimedtseren Enkhee)

IKEF rikoltas laŭdon el Kroatio

“Mi dankas al vi pro sendo de la "Merkato" n-ro 102. Temas pri tre bona fakrevuo kun diversaj enhavoj kaj interesaj temoj. En unu numero de la revuo estas produktado de vino, pri Nepalo, pri Hajnano en Ĉinio ktp. Mi gratulas pro sukcesa, diligenta laboro.

Zlatko Hinšt, Kroatio.

===== vortoj: 1240 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.: La kolekto de EKO:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 30.).

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.